PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Pilo-Press
Jara abono 30 GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



N-ro 8/78 -22 febr 1978
Aperas ĉiusemajne

## Semajno de Internacia Amikeoo

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco 1978 ni deziras al ĉiuj legantoj, abonantoj kaj kunlaborantoj sukceson kaj prosperon en la privataj kaj por-esperantaj agadoj!
Speciale ni deziras ke regu ĉiam kaj ĉie la spirito de internacia amikeco trans ĉiuj limoj ĉe homoj de bona volo - malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj obstakloj!

Ludwig Pickel - Pilo-Press

**********************

## Denove haveblas "Post la kurso"

Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) re-eldonis en fotorepreso la lernolibron por progresintoj

Post la kurso de Wingen

La libro entenas ankaŭ la ŝlosilon.

La prezo estas 15,- GM.

Libroservoj mendu ĉe SEL . Unuopaj mendantoj povas mendi la libron ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Bedaŭrinde ni devas informi, ke momente estas denove elĉerpita la lernolibro por komencantoj "Wir lernen Esperanto".

## Esperanto - ĉu eŭropa aŭ azia lingvo en germana lingvo

En la traduko de Günther Becker SEL volas eldoni la broŝuron "Esperanto - ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?" de d-ro C. Piron en la germana lingvo. Kiel konate la broŝuro aperis en la Esperanta originalo ĉe UEA.

Libroservoj mendu ĉe SEL (Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler). Unuopaj mendantoj antaŭmendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Nürnberg.

**********************

## Esperanto-Federacio de Orienta Francio

Strasburgo (pp) - La 8-an kaj 9-an de aprilo 1978 okazos en Strasburgo, Foyer du jeune, Ouvrier chretien, 6, rue de Bitche, la 37-a Kongreso de l' Esperanto-Federacio de Orienta Francio.

## 56-a Germana Esperanto-Kongreso

Augsburg (pp) - Por pentekosto, la 12-a ĝis 15-a de majo 1978, Augsburg atendas la germanajn esperantistojn kaj gastojn el multaj landoj.

Ĉu vi volas ĝui kelkajn tagojn en esperantista atmosfero, ĉu vi volas aŭskulti kaj diskuti, ĉu vi volas travivi Esperanto-teatraĵon, ĉu vi volas rigardi la plej novajn Esperanto-eldonaĵojn, ĉu vi volas partopreni en interesa ekskurso, ktp., tiam nepre aliĝu al la 56-a Germana Esperanto-Kongreso en Augsburg.

La ĝenerala kongresa adreso estas: Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, D-8901 Steppach.

Reagoj - opinioj

Post aŭskultado de la elsendo de Radio Moskvo mi skribis longan leteron al la redakcio, menciante, ke la universitata grupo en Münster disdonis pli ol 500 flugfoliojn pri la elsendo.

Cetere: kelkfoje dum la lastaj monatoj la universitataj grupoj de Bonn, Berlin kaj Würzburg kelkfoje estis menciataj, sed ekzistas ankaŭ grupoj en Karlsruhe, Saarbrücken, Darmstadt kaj Münster. Nia grupo en Münster nun havas 25 membrojn, 19 el ili membroj de GEA aŭ GEJ. Ekde du jaroj ni havas regulan programon kun prelegoj, diskutoj kaj paroligaj rondoj en la kadro de la internacia centro de la universitato "Die Brücke", kie ankaŭ ekzistas anglalingva, franclingva kaj hispanamerikana rondoj. La 15-an de februaro okazis komuna semestrofina vespero de ĉiuj kvar grupoj. En Münster gastis pasintan jaron eksterlandanoj el sep landoj. En la grupo mem estas du turkoj, unu belgino, unu kroato kaj unu indoneziano. Dum aprilo kaj oktobro okazos intensaj kursoj por studentoj, dum la semestroj porprogresintaj kursoj.

Rudolf Fischer, D-4401 Nordwalde

Citaĵo el la raporto de GEA-Estraro

Aperis nun n-ro 10 de Esperanto en F.R. Germanio kun la raporto de GEA-Estraro pri la jaro 1977. Pri la raporto mem ni pli detale skribos en unu el la venontaj numeroj.

En ĉi tiu numero ni volas publikigi la jenan citaĵon el la raporto:

"Raporti korekte kaj en la ĝusta proporcio al la graveco, estas tasko apenaŭ juste solvebla. Se en tio aŭ en nemencio kulpas la kompilintoj, ili petas indulgon. Sed plej ofte la ĝenerala sekretario aŭ la redaktoro ne ricevis informojn. Kelkfoje ni devis ĉerpi el Pilo-Press, kiu komprenenble pro sia semajna apero povas raporti pli aktuale kaj detale. Al sci-emuloj pri la okazaĵoj naciaj kaj internaciaj en Esperantujo ni nepre rekomendas aboni Pilo-Press ĉe s-ro Ludwig Pickel, poŝtfako 2113, 8500 Nürnberg 1."

Semajna komentario de ORF

La semajna komentario de la Esperanto-elsendoj de ORF Wien de la 11/12 de februaro tekstas jene:

"Kuraĝe nia kanceliero d-ro Bruno Kreisky flugis al Moskvo, centro de la grip-epidemio, kiu, cetere, minacas nun ankaŭ Vienon.

Kun Leonid Breŝnjev, kiu, trasuferinte sian gripon, denove bonhumoras rozkolore, Kreisky intertraktis pri la aŭstra-rusa komerco, ĉiam deficita por Aŭstrio, kaj nun pli ol iam antaŭe pro la prezaltigo por la rusa ter-gaso, kiun ni kvantege importas.

Por kompensi la deficiton Kreisky prezentis paletron da ofertoj. Plejmulte interesis la rusojn liveraĵoj por atomenergiejoj. Ĉar ŝajnas, ke en aliaj landoj ne ekzistas pro atomenergiejoj iu problemo.

Nur ĉe ni la politikistoj ne kuraĝas decidi, ke nia unua kaj komplete preta energiejo nun ankaŭ ekfunkciu. Ili timas la reagon de la amasoj ĉe la venontaj elektoj. Tiujn amasojn teruras jam la nura vorto "atomo". Ili memoras la atombombojn kaj forgesas, ke la multaj, en Eŭropo - oriente kaj okcidente - deponitaj, atomprojektiloj minacas nin senkompare pli mortdanĝere ol la absolute utilaj atomenergiejoj.

Minacas la homojn ankaŭ la diversaj konfliktoj en ekzemple Afriko, Hindoĉinio kaj Proksimoriento. Tial Kreisky prave rifuzas la postulon de izraeliaj politikistoj, ke Eŭropo sin tie ne enmiksu. Nova milito en la Proksimoriento sentigus sin ankaŭ ĉe ni. Finfine: eldiro de opinio aŭ provo montri solvon, ja tute ne estas jam sin-enmikso!"

La komentarion verkis d-ro Alfred Macher; prezentis ĝin d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal.

Skisemajno por fervojistoj

Grainau (pp) - Ĵus finiĝis la ĉi-jara Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno (IFES) okazinta en tre moderna sindikata hejmo "Haus Hammersbach" en Grainau, baze ĉe la plej alta monto "Zugspitze" en la germana parto de la Alpoj. Samloke okazis du semajnojn antaŭe la tutmondaj skikonkursoj.

Preskaŭ cent amikoj de vintra sporto el naŭ nacioj kunvenis por komune skii, migradi (ekz. al la glaciplena ravino Partnachklamm), por kanti, danci, por ĝui la nepriskribeblan etoson de tia rondo internacia. Ĉiutage la lingvaj komencantoj povis sekvi Esperantokurson. Same por la skiantoj komencantaj estis instruantoj je dispono kaj premiado kronis la klopodojn de ambaŭ konkurofakoj.

Dum la vesperoj ne mankis amuza skeĉo prezentita de gefrancoj en originala pariza vervo, premiado de la plej belaj maskoj dum "karnavala vespero", folklora muziko, filmoj, diapozitivoj kaj multe da kantado komuna kompilita kantaro. La tempo apenaŭ sufiĉis por ĉiuj programeroj kaj la noktoj ofte estis tre mallongaj....

Pluraj el la partoprenintoj jam ĉi tie aliĝis al la venontjara IFES, okazonta en Maria Alm, Aŭstrio.

Ritt

Denove pri Munkeno

München (pp) - Ne nur ZDF (La Dua Germana Televido) raportis la 23-an de januaro pri la malfermo de la Esperanto-gastejo kaj pri Esperanto. Surprize aperis la 30-an de januaro dum grupkunveno teamo de Bavara Televido por fari raportaĵon, kiu estis sendita la 4-an de februaro en la rubriko "Bayern heute" de la 3-a Programo. Tiu televida elsendo, en kiu oni disaŭdigis diversajn intervjuojn, komenciĝis per citaĵo el la radio-elsendo de Radio Vatikana.

Kurso en Nordwalde

Nordwalde (pp) - La 14-an de februaro komenciĝis en Nordwalde, F R Germanio, la unua Esperanto-kurso en la distrikto Steinfurt kadre de la ŝtata popolaltlernejo. La lokaj gazetoj dufoje raportis pri tio detale. Rudolf Fischer, kiu gvidas la kurson, disdonis ekzemplerojn de "5 vor zwölf" kaj "GEJ informiert". Fine 11 personoj aliĝis. La kurso daŭros ĝis junio.

Trilanda renkontiĝo - malĝusta dato

Aachen (pp) - La Trilanda Renkontiĝo inter FR Germanio, Belgio kaj Nederlando, pri kiu ni raportis en n-ro 7/78 de Pilo-Press, ne okazos de de la 29.4. ĝis 1.5.78, sed nur la 3-an kaj 4-an de junio 1978.

Laŭ informo de Esperanto-Grupo Aachen laŭ la unua dato la Trilanda Renkontiĝo koincidus kun la Belga Esperanto-Kongreso en Charleroi. Kaj sen la partopreno de la belgaj gesamideanoj Trilanda Renkontiĝo fakte ne povas okazi.

Sekve de la ŝanĝo de la dato ne okazos la teatraĵo "La Hipnoto", ĉar dum la nova dato la polaj geaktoroj ne plu restados en F R Germanio.

Pliajn informojn donas la kutimaj informanto: S-ro Paul Firmenich, Jahnstr. 5, D-5190 Stolberg.

A n o n c o

BIBLIA REVUO

Abonu kaj legu la trimonatan gazeton
pri bibliaj kaj orientaj studoj

Jara abonkotizo por 4 numeroj 18,-- GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113
D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56-851

Esperanto en Radio

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio estas sendube unu el la plej gravaj praktikaj uzadoj de Esperanto. Kaj tio ĉefe validas por la ĉiutagaj informoj kaj novaĵoj el la politika, ekonomia kaj kultura kampoj. Ĉiutage la Esperanto-redaktoroj de Radio Varsovio devas adapti la lingvon al la necesoj kaj uzi koncernajn vortojn. Ĝuste la ĉiutagaj informjurnaloj de Radio Varsovio distingas tiun stacion de la aliaj.

Sed ankaŭ la aliaj programeroj estas interesaj kaj aktualaj. Ni menciu jenajn: Problemoj de la pola inteligentularo; La kunlaboro de la socialismaj landoj en la sfero de la kosmo; Pri la gmina kolektiva lernejo; Post la interparoloj de Honecker kaj Gierek. Unu el la oftaj temoj lasttempaj estis "La konstruantoj de la Popola Pollando". Krome ni eksciis, ke la pola ministro pri eksteraj aferoj vizitis Vjetnamion, ke lekciantoj de la pola lingvo el Pollando kaj F R Germanio kongresis en F R Germanio.

Ĉiam kun intereso ni sekvas la panoramon de internaciaj eventoj, kiu peras la polan starpunkton al la aŭskultantoj.

La "Esperanto-Ekspreso" ĉi-foje redonis la intervjuon de A. Pettyn kun Victor Sadler pri la evoluo de Esperanto en la tria mondo kaj speciale en Teherano.

Denove, kiel ĉiam, mi aŭskultis la leterkeston kun citaĵoj de korespondantoj. Sed mankis denove la statistika materialo. Same ni ne plu aŭdis la rubrikon "El la temoj de la semajno", kiun kutime verkas Jan Klimek. Kial Varsovio estas tiom silentema rilate la kunlaborantoj? Mi opinias, ke ankaŭ interesas la aŭskultantojn tio, kion faras la redaktoroj.

Mi denove aŭdis la Esperanto-anguleton kadre de la germana programo. Oni citis el Pilo-Press, n-ro 6. Sed ŝajne oni ne plu aŭdigas la anguleton post la elsendo je la 17,30 h.

Radio Vatikano ĉi-foje disaŭdigis leterkeston. El ĝi ni citas: "La leteroj, kiujn ni ricevis depost la ĵus pasinta leterkesto, nome de la 14-a de januaro ĝis la 14-a de februaro, estis entute 319, kun la rimarkinda nombro de 52 novaj aŭskultantoj. La leteroj venis entute el 24 nacioj, tio estas: Germanujo kaj Pollando: respektive 65; 39 el Italujo; 38 el Francujo; 28 el Hungarujo; 14 el Nederlando; 11 el Britujo. La aliaj landoj estas: Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Hispanujo, Israelo, Jugoslavio, Kanado, Luksemburgio, Malto, Peruo, Portugalujo, Sovetunio, Svisujo.

Notindan antaŭenpaŝon kompare kun la lastaj monatoj oni rimarkas pri Francujo precipe merite de pastro Roger Degrelle....."

Radio Vieno ORF. Tiu stacio nun estas bone aŭdebla kaj ni esperas, ke kun la pliboniĝo en la aŭdebleco kresku la nombro de la korespondantoj. La interesa programo vere meritas pli multajn leterojn. Ni aŭdis ĉi-foje intervjuon kun pola esperantisto. Ni citas el unu el la lastaj leterkestoj: "Pilo-Press" numero 5 prezentas nian januarfinan komentarion de d-ro Werner Schmidt, numero 6 dediĉas tutan paĝon al letero de Joachim Giessner kritikante bonvene la komentarion de d-ro Alfred Macher pri nia atomenergieja problemo....

Svisa Kurtonda Servo. Ge-sroj Gacond daŭrigas la citadon el Svisa Espero okaze de la datreveno de Svisa Esperanto-Societo. Certe antaŭ 75 jaroj regis alia etoso en la Esperanto-medio, sed ofte ankaŭ en la nuna tempo pli da entuziasmo por Esperanto povus multe helpi. Interesan prelegon denove faris d-ro A. Baur pri la romanĉa lingvo en radio kaj televido de Svislando. Laŭ li la informoj kaj novaĵoj estas esencaj por la romanĉa lingvo. Jen oni vidas paralelon kun Esperanto. Ju pli da Esperanto-stacioj disaŭdigas informojn kaj novaĵojn en Esperanto, des pli kreskas Esperanto kiel vivanta lingvo. Venontfoje d-ro A. Baur parolos ankaŭ pri la 75-a datreveno de Svisa Esperanto-Societo.